ESPERANTO
MONATA GAZETO DE E-HANDIKAPULOJ

# INFORMILO 5

MAJO 2023 Kol. 456/39

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

**Enhavo**: Invito al Olomouc Finkalkulo Babilado
Ella kun avino en muzeo Francaj rezultoj Libro-foiro El la redakcio

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx


## Invito al Olomouc

**Ĵaŭde la 11-an de majo ekde la 13a horo** okazos en Olomouc grava literatura evento, kiun komune okazigas la eldonejo KAVA-PECH kun la loka Esperanto-klubo.

Estos prezentitaj ĉiuj novaĵoj en Esperanto, eldonitaj ĉi-jare. El tiuj jam disponeblaj temas pri:




**Jarsezonoj kaj festotagoj per okuloj de bestoj** de Eva Buttová, esperantigita de Pavol Petrík, kun koloraj ilustraĵoj de Mirka Tomečková. Temas pri malnov-testamentaj rakontoj vidataj de bestoj. Kvankam la aŭtorino celas per ĝi infanojn, laŭ la recenzo de Max Kašparů *ĝi taŭgas ankaŭ al plenkreskuloj, ĉar ĝi ja estas por infanoj, sed ne infaneca.*




**Bluaj neĝoj** de Piotr Bednarski, esperantigita de Ewa Grochowska estas literature prilaboritaj travivaĵoj de la aŭtoro devenanta de miksita poljuda familio en siberia ekzilejo, kiun li transvivis kiel ununura el la familio.

Krome estos enmerkatigitaj du tute freŝaj novaĵoj, kiuj aperos fine de aprilo:

**Sadako volas vivi!** de Karl Bruckner, esperantigita de la membro de la loka Esperanto-grupo Olomouc, Jan Duda. Temas pri romanstile prilaborita vera historio pri japana knabino Sadako Sasaki el Hiroŝimo, kiu travivis la atom-bomban atakon de la urbo sen videbla vundiĝo, sed post 9 jaroj ŝi mortis pro tiam ricevita dozo de radium-radioj. Ŝia statuo en la Parko de la Paco en Hiroŝimo fariĝis simbolo kontraŭ uzado de atomarmiloj. Kiam ĝin vizitis Jan Duda ĉe unu el siaj koncert-turneoj tra Japanio, li estis tiom kortuŝita, ke li decidiĝis konigi ŝian historion al esperantistoj.




**Mia vivo kun Esperanto** de Petr Chrdle estas retrorigardado de la aŭtoro al siaj travivaĵoj pere de

Esperanto: iuj seriozaj kaj lernigaj, iuj gajaj, tamen ĉiuj interesaj.
Krom tiuj la menciitaj donas ankaŭ esperon (tamen ne certecon), ke eldoniĝos ankaŭ la nun fin-preparata verko **Ekster la limo. Apokrifoj**. Temas pri origine tradukitaj apokrifoj ĝis nun ne aperintaj en Esperanto fare de Gerrit Berveling.




Ne nur ĉiuj nomitaj verkoj, sed ankaŭ aliaj eldonaĵoj de KAVA-PECH estos tie aĉeteblaj kun grandaj okazaj rabatoj.
Kvankam la preciza programo ankoraŭ ne estas fiksita, vi povas ĝojatendi krom eblo trarigardi multajn interesajn librojn ankaŭ la **aŭtografadon** de Jan Duda, Pavol Petrík kaj Petr Chrdle, vivan muzikon kaj etan bufedon.
La ekspozicio de libroj kun la eblo ilin rabatite aĉeti, estos malfermita **ekde la 14a horo**, la propra programo komenciĝos je 14:30. **La loko:** *Klub pro seniory* (Klubo de emerituloj), Polská 57, Olomouc. Konekto de la stacidomo: Tramo 1 aŭ 7 al la haltejo *Tržnice* (Foirejo), de tie buso n-ro 16 aŭ 29 al la haltejo *U Botanické zahrady* (Ĉe Botanika ĝardeno). La klubejo troviĝas tuj apude. La emerituloj ekde 65 jaroj rajtas uzi ĉe ni tramon kaj buson senpage, sed necesas legitimilo aŭ pasporto por dokumenti la aĝon.
Ĉiuj estas kore invitataj.

Jiří Machačík, prezidanto de la EK Olomouc
Petr Chrdle, KAVA-PECH, chrdle@kava-pech.cz

| **Finkalkulo de AEH de la jaro 2022 + budĝeto por la jaro 2023** | | | |
|---|---|---|---|
| | **budĝeto 2022** | **realo 2022** | **budĝeto 2023** |
| **Enspezoj** | | | |
| donacoj | 10 000 | 12 100 | 10 000 |
| membrokotizoj | 20 000 | 17 825 | 18 000 |
| seminarioj | 0 | 5 974 | 0 |
| ekskursoj | 0 | 0 | 0 |
| **Sume** | **30 000** | **35 899** | **28 000** |
| **Elspezoj** | | | |
| materialo | 6 000 | 4 771 | 4 500 |
| poŝto, telefono, interreto | 15 000 | 21 404 | 18 000 |
| riparoj, servoj | 5 000 | 5 340 | 4 500 |
| gazetoj, libroj | 500 | 0 | 0 |
| kunvenoj | 500 | 2 464 | 500 |
| vojaĝelspezoj | 1 000 | 0 | 500 |
| banko | 0 | 0 | 0 |
| seminarioj | 0 | 0 | 0 |
| ekskursoj | 0 | 0 | 0 |
| donacoj | 1 000 | 0 | 0 |
| **Sume** | **29 000** | **33 979** | **28 000** |
| | | | |
| **Enspezoj - elspezoj** | **1 000** | **1 920** | **0** |
| | | | |
| Petr Angelov p.p.m. | | Ing. Stanislava Nováková p.p.m. | |
| prezidanto de AEH | | kontistino de AEH | |
| | | | |

# Babilado

Komence de ĉi tiu jaro mi eksciis, ke en Prago estas organizata "babilado". La ideo venis de la esperantistino Radka Švejcarová. Ŝi sciigis nin, ke la okazo estas por esperantistoj el Prago kaj la proksima kaj eĉ malproksima ĉirkaŭaĵo. Ili renkontiĝadas unufoje en tri semajnoj en agrabla medio de vjetnama restoracio – kun eblo de bona vespermanĝo kaj trinko. Ili parolas inter si nur Esperante pri ĉio. Kelkfoje tamen estas prezentataj temoj, kiuj estos diskutataj en la venonta kunveno. Ĉi tien venas homoj, kiuj jam delonge parolas Esperanton kaj bone regas la lingvon, sed ankaŭ tiuj, kiuj ĉefe aŭskultas kaj intervenas en la konversacion per nur malmultaj vortoj, kiujn ili konas, kaj la spertaj homoj helpas per traduko kaj gramatiko. Estas tie ĉi tre agrabla kaj amika etoso.



Mi parolis pri tiu ĉi grupo, kie mi ankaŭ partoprenis, en nia Esperanto-klubo en Pardubice. Kelkaj anoj el nia klubo ankaŭ cerbumis pri la partopreno, sed pro labor-okupado tio ankoraŭ ne realiĝis. Eble instigite de tio nia klubano Láďa Hakl organizis similan kunvenon – en la Urba biblioteko. Ni, kvar klubanoj, renkontiĝis tie kaj Láďa anoncis al ni, ke li ŝatus enkonduki ankaŭ ĉi tie "la babiladon". Ni fakte parolis Esperanton (aŭ almenaŭ ni klopodis) dum unu horo. Nian Esperanton „gardis“ kaj kuraĝige korektis Pepa Hron, kiu ankaŭ venis inter nin. Poste, elĉerpitaj, ni reŝanĝis al la ĉeĥa kaj konsentis, ke la babilo-kunveno al ni plaĉis, kaj ke ni okazigos ĝin denove.

Laŭ Eva Pazourková tradukis Ludmila Srbová

## Ella kun avino en muzeo

Pasintsemajne, ĵaŭde mi estis kun mia pranepino Ella en la muzeo, kiu troviĝas en la kastelo Pardubice. Tie estas ekspozicio de vitro kaj la muzeo en tiu ĉi tago estis malfermita nur por infanoj. La infanoj perceptadis la vitron per ĉiuj sensoj:
Per la okuloj – Ella trapromenis la ekspozicion kaj poste ŝi devis kunmeti puzlon – pri unu objekto, kiun ŝi vidis en la ekspozicio.
Per palpado – ŝi senvide devis distingi la globetojn el vitro de la globetoj el aliaj materialoj: el papero, el metalo, el potargilo, el velurledo.
Per flarsenso – ŝi flaris al vitra konfitujo de kukumoj kaj de spicaĵo kaj ŝi devis rekoni, kio estas interne.
Per aŭdosenso – ŝi fingrofrotis („ludis") la randon de glasetoj parte plenigitaj de akvo, kaj aŭskultadis la sonon.
Nur sian gustosenson ŝi ne uzis – vitro ne enhavas „gustecon".
Kaj fine ŝi pentris vitralon sur fenestro el papero.
Ella ekzaltiĝis. Sur la loko estis ankaŭ redaktorino el la TV, kaj el radioelsendejo Pardubice, kiu ĉion fotografis kaj nun tio troviĝas en "fejsbuko".

Eva Pazourková, tradukis Ludmila Srbová

## Francaj rezultoj pri la stato de instruado

En Francio, Eo-kursoj okazas en lernejoj, kie troviĝas agemaj esperantistaj lernejaj instruistoj. Ankaŭ emeritaj lernejaj instruistoj sukcesas organizi tiajn kursojn. Tiuj kursoj okazadas ĉefe en mezlernejoj (ĉu por 11/15-jaruloj, ĉu por 15/18-jaruloj), malofte en bazlernejoj. La kursoj estas ĉiam nedevigaj. La instruistoj devas varbi la lernantojn kaj motivi ilin, por ke ili plu lernu. Okazas unuhora (aŭ malpli longa) leciono semajne do entute malpli ol 30 horoj/jare. Foje eĉ malpli. Kontaktoj kun

klasoj en aliaj landoj, eĉ vojaĝoj por renkonti aliajn Eo-lernantojn estas instigo al lernado.

La lernmetodoj por lernejanoj ne abundas kaj ĝenerale taŭgas por 60 horoj aŭ pli da instruado kaj ĝenerale ne okupiĝas pri motivado kaj uzado de la lingvo. Foje la instruistoj kreas propran instrumaterialon.

Mankas tre facilaj legaĵoj, tre facilaj filmetoj por lernejanoj; la ekzistantaj estas malfacile troveblaj. Mankas helpo por organizi kontaktojn inter klasoj de aliaj landoj… El EKO 2023

## Libro-foiro en Rio-de-Ĵanejro

La Komisiono de UEA por Amerika Agado havas inter siaj taskoj en 2023 la informagadon al neesperantistoj en unu el la plej grandaj libro-foiroj de Latinameriko, la Internacia Libro-Bienalo de Rio-de-Ĵanejro, kiu dum 10 tagoj altiras kutime pli ol 600 000 vizitantojn, ĉefe junulojn, lernejanojn, universitatanojn, legemulojn kaj interesatojn pri kulturo ĝenerale. La bienalo okazas en ĉiu nepara jaro ĉirkaŭ septembro. En la jaroj 2015 kaj 2017 la brazila Esperanto-movado sukcesis oficiale partopreni la eventon pere de institucia budo por disvastigi Esperanton.

La rajto havi tiun budon kostas al la institucioj ekde 4500 € (sumo por mendo de minumuma spaco kun bretoj por ekspoziciado de la libroj). En 2023 la trian fojon la Esperanto-movado partoprenos la eventon, sub kunordigo de Asocio Esperantista de Rio-de-Ĵanejro (AERĴ) kaj Brazila Esperanto-Ligo (BEL). La unuan fojon UEA subtenas la agadon kaj pro tio al ĉiu 1 € donacita UEA aldonos 2 € el propra buĝeto, tiel ke la organizantoj de la agado povu ricevi entute la sumon de 4500 €.

UEA do bonvenigas ankaŭ vin subteni per donaco. La organizantoj jam sukcesis akiri ĉ. 1600 € de brazilaj esperantistoj kaj la Amerika Komisiono petas nun la kontribuon de la internacia komunumo. Pro la triobligo de UEA, tio signifas, ke, se nun kolektiĝos pliaj 1000 €, la celo estos plene atingita. Vi povas sendi vian donacon al la UEA-konto Informado (https://uea.org/alighoj/donacoj/informado), al-donante kiel komenton: "Bienalo Rio".

Tiu informagada projekto enkalkulas aktivulan trejnadon por trafa varbado, volontulan deĵoradon dum la evento kaj retan E-kurson por portugal-parolantoj tuj post la evento. Krom UEA kaj BEL, partneras en tiu projekto ankaŭ Brazila Esperantista Junulara Organizo (BEJO) kaj la brazila eldonejo Temática, kiu publikigas librojn en kaj pri Esperanto. Informojn pri tiu agado oni trovas ĉe https://www.aerj.org.br/bienal, https://mallonge.net/bienal2015, https://mallonge.net/bienal2017. El la Gazetaraj Komunikoj de UEA

**El la redakcio:** La 10-an de marto 2023 forpasis s-ino **Květuše Kafková,** honora membrino de Ĉeĥa Fervojista Esperanto-Asocio, kiu en aŭgusto atingus 100-jariĝon. Honoron al ŝia memoro

**INFORMILO** – monata gazeto por esperantistoj-handikapuloj + suplemento **ANTAŬEN**
Eldonas AEH – Asocio de esperantistoj-handikapuloj en Pardubice
Redaktoroj: Mirka Kosnarová, Ludmila Srbová
Adreso: Svaz zdravotně postižených esperantistů, Na Okrouhlíku 953/21,
530 03 PARDUBICE, CZ tel. **+420 721 537 970**
e-mail: **aeh@esperanto-aeh.eu** interreto: **www.esperanto-aeh.eu**
Banka kunligo: Fiobanko, kont-numero de AEH 2801322017, bank-kodo 2010
Bankovní spojení: Fio banka , číslo účtu AEH 2801322017, kód banky **2010**
**IBAN:** CZ3520100000002801322017 SWIFT/BIC: FIOBCZPPXXX
La jarabono de Informilo **20 €** (en kovertoj), aŭ **10 €** (e-mail)
Roční předplatné Informila **300,-Kč** (v obálkách), nebo 150,-Kč (v e-mailu)
Při platbách vždy uveďte vaše členské číslo (naleznete nad vaší adresou) jako variabilní symbol! Příspěvek svazu AEH v dobrovolné výši.
Kotizo por AEH propravola. Kodo ĉe UEA: aehk-z
La redakcio ne ĉiam havas la saman opinion kiel la aŭtoroj de la artikoloj.